

La Esperanta Prosodio *

(Resumo de prelego dum la Jubilea Konferenco 1997-04-17/18
ELTE-Universitato en Budapeŝto)

F. G. RÖSSLER (DE)

"Esperanto estas regula, logika, senescepta lingvo". Nelaste tiu ĉi karakterizado daŭre altiras novajn adeptojn al la Lingvo Internacia de d-ro Zamenhofo. Ankaŭ min komence logis la reguleco, la logikeco, la senescepteco deklaritaj kaj sankciitaj en la dekse reguloj de la Fundamento. Sed tiu ĉi alta pretendo montriĝis lezita jam en ties aldonaj tekstoj, ekzemple rilate la nedefinitan artikolon ("Unu virino havis du filinojn...") aŭ la foje aspektecane uzadon de la nete tempa participsistemo de la Gramatiko. Se oni tiuĉirilate ankoraŭ koncedis cerbumadon pri interpretado, la ofta misakcentado de plursilabaj vortoj en la esperanta poezio jam dekomence ekscitis min. Laŭ la Zamenhofa Gramatiko - deka paragrafo - la akcento troviĝas ĉiam sur la antaŭlasta silabo. Kontraŭe malĝusta akcentado montriĝis en la literaturo fenomeno ofta, ĝenerala, intenca okazo eĉ en originalaj produktoj, ne nur lasta rimedo en seneliraj provoj Esperantigi alialingvajn komplikajn versojn. Jam en la unuaj monatoj de mia Esperantolernado senkomprene kaj amare mi replikis per propraj linioj:

Poemaĉo:

Flikita per licencoj -	laŭritme ege stumbla
laŭdata en recenzoj...	leganton igas grumbla,
Profundidea verko	valoras nur al sterko.

Aŭ, post konatiĝo kun la "Infana raso", mi adresis soneton al

* Prosodio: origine la vortakcento, bazanta en la klasika Greka lingvo sur la muzika vokalelprononco; plue la proprecoj de la vokaloj; daŭro de la spirado kaj de la tempo (longo kaj nelongo); hodiaŭ la tuta sonkonturo ĉe ĝusta prononco de vorto en frazo, melodio (intonacio) kaj ritmo; en skribo ankaŭ la apliko de la silaboj koncerne ilian kvantecon laŭ ritmo en rilato al la akcentado kaj tempa koherenco. Prosodio estas antaŭŝtupo kaj bazo de la metriko, tre diversa en la unuopaj lingvoj. En la muziko ĝi signifas la doktrinon pri la alĝustigo de la lingvaj elementoj (metro, verso, ritmo) al la muzikaj elementoj.

VILHELMO OLDO

Famulo vi ja fakte estas,
Vilhelmo Oldo, vigla Skoto!
Per lerta man' kaj riĉa doto
vi viajn versojn verve vestas!

Ho ve! Poetadmiro ĉesas.
Licencoj svarmas ĉie rege:
"Kvankam" vi ritmas fierege...
Ĉu fakte tion Z. permesas?

"Kiu, kia!" - ja kial fuŝi
kaj ne per puraj ritmoj tuŝi
la legantaron? Ne forpela

lingvajo kontraŭ-Fundamenta,
stumblige aĉa, kontraŭsenta!
Al majstro decas stil' modela!

Evidentiĝis, ke ne la Skota korifeo la unua kaj sola kulpis kontraŭ la deka regulo. Mi konstatis, ke "oni" - tiu vorteto bedaŭrinde inkludas ankaŭ la enmovade kultatajn "plej bonajn aŭtorojn" - permesadis (ĉu ankoraŭ -as?) al si daŭre licencojn, kaj en la "Parnasa Gvidlibro" de Koloĉajo (Hungaro) kaj Varengjeno (Franco) la licencoj fariĝis kvazaŭ reguloj.

Tiu ĉi permesemo fontas inter alie en la filologia (aŭ lingve heredita) kompreno de la metriko postsekve la antikvajn lingvojn Helena kaj Latina (kvanteca metriko kun longaj kaj mallongaj silaboj) kontraste al la pli akcenta de la Germanaj lingvoj. Bele esprimiĝas jena etna diverseco ĉe Varengjeno en la menciita libro, deka paragrafo: "Kaj estus granda peko kontraŭ la belsono kaj la senco prononci ... laŭ la germana metriko, pedante akcentante ĉiun poduan silabon...". Kaj en la dektria paragrafo pri la licenco "stumblo" li klarigis: "La stumblon uzis unue Grabowski en

Mazepa kaj Pan Tadeus. Ĝia uzo en la lastaj jaroj ĝeneraliĝis precipe inter hungaraj kaj katalunaj poetoj." Per tio li aludas precipe la Budapeŝtan Skolon kun Koloĉajo ĉekape. Do ŝajnas, ke metrikaj preferoj dependas de la deveno respektive enkulturigo de aŭtoroj.

La sekva teksto provas komprenigi la inklinon al kontraŭregulaj ritmoj ekzemple de Hungaraj aŭtoroj, ĉu originale aŭ traduke verkantaj. Koloĉajo jam en sia rimita "La Arto Poetika" ne malofte aplikas la teorie prezentitajn licencojn de Varenĝeno, ekzemple en jenaj intersekvaj linioj:

"Kiu de tiam kreskis en riveron
Tiel grandegan, ke sub ĝia ondo..."

La fono de tia akcentado, oni nomu ĝin "lerteco" aŭ "difekto", klariĝis al mi almenaŭ rilate al Hungaroj, kiam mi kune kun mia edzino estis instruanta muzikon dum la "Unua Esperanto-Gimnazo" en Bratislavo, la iama Hungara *Pozsony*. Tie en la libertempa programo Hungaroj kantis proprajn kaj tradukitajn tekstojn tiom misakcente, ke ne nur ni kun niaj muzikistaj oreloj nur ironie povis ĝui la prezentadon, sed ke la rektorino - mem Hungarino - iom honte petis min poste prelegi pri "Ĝusta prosodio en Esperanto". Tiam mi plenumis la deziron iom improvize. La ĉeestantaro afable aŭskultis. Tamen tuj post la prelego ne nur la Hungaroj, sed ankaŭ Ĉeĥino daŭrigis fervore kaj verve regali la kongresanaron per 'modelaj' misakcentoj poeziaj kaj kantaj. Rapide tiu ĉi fenomeno ne estas ŝanĝebla, sed almenaŭ komprenebla.

Malĝusta Esperanta akcentado de Hungaroj fontas en la kutimoj de ilia lingvo, kiu ja, kiel konate, ne estas hind-eŭropa, sed finno-ugra. Eble ankaŭ la latina lingvo, longatempe oficiala lingvo inter sciencistoj kaj eĉ en la Hungara parlamento, postlasis spurojn, sed certe nur inter intelektuloj. En la Hungara tre praktike la akcento regule troviĝas sur la unua silabo de plursilaba vorto. Estas eĉ egale, ĉu tiu ĉi silabo estas longa (indikata per supersigno) aŭ mallonga. Se en muzikaĵo ligiĝas teksto kun melodio, la lingva akcento normale devas koincidi kun la regulaj muzikaj metrikaj

reguloj, ne nur en Hungaraj kantoj. En la Eŭropa kaj Eŭropdevenaj muzikstiloj en la bazaj taktoordoj akcentoj kaj malakcentoj troviĝas

1. En kvarkvarona takto (ekz. marŝo): — ◡ — ◡. La akcento sur la tria bato nur estas subordigita flankakcento.

2. En trikvarona takto (ekz. vals): — ◡ ◡.

Akcentoj kontraŭ tiu ĉi baza ordo ja povas vigligi la muzikon kaj ofte estas bonvenaj kaj en "seriozaj" kaj en folkloraj kaj en distraj muzikaĵoj, sed kaze de samtempa lingva misakcentado la rezulto fariĝas duba, ofte eĉ ridiga pro la konflikto inter la du sistemoj. Ĝustan akcentadon montras jena Hungara popolkanto:

Ekz. 1: "Elvesztettem"

El - vesz - tet - tem zseb - ken - dő - met, szi - dott a - nyám ér - te,
an - nak, a - ki meg - ta - lál - ja, csó - kot a - dok ér - te!

Sed la afero ne ĉie restas tiom simpla kaj ĝusta. Multaj Hungaraj popolkantoj ege enkonfliktigas la muzikan kaj la lingvan akcentojn. Por montri nur unu tian melodion ĉe la fidinda, neatakebla korifeo de la popolmuzika esplorado Hungara, *Kodály Zoltán*, ni rigardu en liajn "Biciniumok", kie li notis popolkantojn akurate laŭ la kantadoj de kamparanoj nesciaj pri muziksistemoj ktp. Kaj ni trovas jenon:

Ekz. 2: "Hess, páva"

Pontos ritmusban, $\text{♩} = 132$
1. Hess, pá - va, hëss, pá - va, Csá - szár - né pá - vá - ja, Ha én pá -
2. Jóbb reg - gel fél - kel - nek, Fö - lyö - viz - re mën - nek, Szár - nyam - csat -
1m. (nek.) 1. Hess, pá - va, hëss, pá - va, Csá - szár - né pá - vá - ja,
2. Jóbb reg - gel fél - kel - nek, Fö - lyö - viz - re mën - nek,
va vol - nek, Jóbb reg - gel fél - kel - nek. (Ndl.)
tog - tat - nám, Szep - töl - lam bul - lat - nám.
Ha én pá - va vol - nek, Jóbb reg - gel fél - kel -
Szárnyam - csat - tog - tat - nám, Szep - töl - lam bul - lat - nám, Szep - töl - lam bul - lat - nám

Oni tuj vidas, ke ekzemple la akcentenda (kaj krome longa) unua silabo de "páva" (pavo) troviĝas en almenaŭ tri diversaj lokoj de la taktoj, do foje havas fortan, malfortan aŭ tute nenian akcenton. Kaj *Kodály* sciis, kion li notis. Li eĉ indikis "*Pontos ritmusban*" ("Guste en la taktritmoo"), emfazante per tio la kontraŭlingvan akcentadon de la muziko! Tian kantadon ankaŭ nuntempe oni daŭre povas renkonti. Kaj ĉiam estas evidente, ke almenaŭ la muzikistoj Hungaroj sentas sin pozitivaj dum tia prezentado. Tio preskaŭ neeviteble influas ankaŭ la Esperantan kantadon de Hungaroj.

La plej emocioplena kantaĵo de la Hungaroj estas ilia himno, kantata ne nur en politikaj ĉirkonstancoj, sed ankaŭ en preĝejoj, lernejoj ktp. Ĝi estas pure Hungara produkto, teksto de *Kölcsey Ferenc*, muziko de *Erkel Ferenc*. Ĝi ja puraakcente komenciĝas per "Isten / Dio" kun la akcento sur la unua silabo, kaj ankaŭ "áldd / benu" prezentiĝas konvenaakcente. Sed jam tuj poste la artikolo "a" kaj la akcento de "magyart" lokiĝis en tute malĝusta muzika pozicio, same aliaj verslinioj kiel ekz. "Jó kedvel, böséggel..." (anstataŭ regule "kedvel, böséggel..").

Ekz. 3: "La Himno"

1. Is - ten, áldd meg a ma - gyart Jó kedv - vel, böség - gel,
2. Szánd meg, Is - ten, a ma - gyart, Ejt vé - szek há - nyá - nak,

Konsekvence ne estas mirige, ke Hungaraj tradukantoj en Esperanton kaj inventantoj de tekstoj originalaj tute nature sekvas la konatajn nacilingvajn modelojn. Ili ne scias, kion ili faras. Sekve la Esperantistoj foje povas ĝui perlojn kiel jenan kanton, en kiu ankaŭ kromsignetoj ne povas kaŝi la ridige kontraŭtaktan akcentadon:

Ekz. 4: "Mortaĉinta rano"

1. Mort-aĉ-int-a ra-no kva-kas A-pud la se-Blin-dul' vi-das: li-el-sal-tas, La-mul'ku-ras
2. ka-la-go, Aŭs-kul-tas ĝin sur-da ho-mo, ĉas-pe-li, Kal-vul'e-kas ha-ron ŝi-ri,
3. Ki-u na-ĝas sen ak-vo. Ho, ve!
La mu-tu-lo ĝoj-kri-i. Ho, ve!
Ves-per-to! En ni es-tas hund-sán-gb.
Ves-per-to! Flu-as en ni hund-san-go.

Aldone kaj konsile estu dirate, ke ekzistas ankaŭ ekzemploj de lerta, diligenta adapto de la Hungara al Esperanto. Estu reprezente menciata tie ĉi nur doktoro *Fehér Miklós*, kun siaj kajeroj 'Esperantigita Poezio' Kaj ankaŭ estu dirate (kvankam ja memkompreneble), ke tiu ĉi kontribuo ne celas denunci misfamige la Budapeŝtan Skolon aŭ Hungarajn Esperantiston unuope aŭ kolektive. Ĉiu popolo havas siajn proprajn problemojn kun la poezio, precipe se kantata. Sed la difekta misakcentado tro ofte pro diversaj regionaj tradicioj enfluis ankaŭ la Esperantan lingvon en ĝia teksta kaj muzika akcentado.

Eble jena konkludo deduktiĝas el mia studaĵo: Esperantistoj pli funde esploru siajn proprajn lingvaj radikojn por kompreni kaj eviti troajn etnismojn en sia uzado de la Internacia Lingvo. Nacilingvaj kutimoj kaj licencoj ne pravigas difektojn en la planlingvo Esperanto.

Adreso de la aŭtoro:

Franz-Georg RÖSSLER
Am Mönchsbusch 6
DE 67373 DUDENHOFEN
GERMANIO